

Odoriko el Pordenone, ĉeĥa Marko Polo

Oldřich Arnošt Fischer

Prelego por Esperantista Klubo en Brno, la 25-an de septembro 2019

Iru do kaj disĉipligu ĉiujn naciojn,

baptante ilin en la nomon de la Patro kaj de la Filo kaj de la Sankta Spirito.

Mateo 28, 19

En la 13-a jarcento Eŭropo estis endanĝerita de mongoliaj atakantoj, kiuj sur ĉiaj rapidaj ĉevaloj kiel lavango invadis multe a landoj kaj sklavigis multe da nacioj. Ĝingis-Ĥano (1162-1227) en la jaro 1206 unuigis tribojn de nomadaj mongoliaj paŝtistoj kaj kreis grandegan regnon (de Pacifiko al Kartvelio). Lia filo Egedej (*Ögedej*) la konkeradon de mondo kontinuis. Rusoj eknomigis mongoliajn atakantojn tataroj (laŭ la vorto *tartarus*, kiu signifas infero), sed tataraj batalantoj ne estis pli kruelaj ol eŭropaj partoprenantoj de kruckavaliraj militiroj. Se ili konkeris iun teritorion, ili tie kreis „Tataran Pacon“. Tio signifis, ke sklavigitaj nacioj devis pagi tributojn al mongolaj regantoj, ĥanoj. Tataroj estis religie toleremaj, ĉar inter ili estis budhanoj, islamanoj, ŝamanistoj kaj animistoj. Post morto de Ĝingis-Ĥano (1227) la grandega imperio disfalis. Super kvar pli malgrandaj partoj de eksa grandega imperio regis posteuloj de Ĝingis-Ĥano.

La tataroj aperis ankaŭ en Moravio. Loĝantoj de nordmoravia urbeto Ŝtramberg ĝis nun rakontas, ke iliaj antaŭuloj kaŝis sin en arbaraj sukreskaĵoj sur proksima monto Kotouč. Sed ankaŭ tie tataroj ilin kelkfoje atakis. La tataroj havis strangan kutimon. Se ili mortigis iun kristanon, ili fortanĉis liajn orelojn. Dum lasta tatara atako alvenis ŝtormo. Fiŝlago, kiu situis super tatara milittendaro, rapide pleniĝis de akvo. Ŝtramberkanoj nokte kaŝe neniigis digon de la fiŝlago. Fortega akvofluo la tataran milittendaron inundis, tataroj ektimis kaj en ĥaoson fuĝis. En ruinoj de inundita tatara milittendaro la ŝtramberkanoj trovis kelkajn sakojn kun kristanaj oreloj. Tataroj ilin konzervis per salo por alporti ilin al sia ĥano Egedej kiel ateston, ke ili brave batalis kontraŭ kristanoj. Ĝis nun en Ŝtramberg por memoro de tiu evento bakadas mielkukojn en formo de homaj oreloj (Oreloj de Ŝtramberg)

Bildo 1.

En Kroniko de Dalimil, kiu estis verkita el la 14-a jarcento, estas priskribita batalo apud Olomouc (1241), en kiu moravianoj tatarojn venkis. Kiam Egedej en sia lando mortis (1241), tataroj volis elekti novan ĥanon. Tial ili ĉesis konkeradon kaj revenis hejmen.

Eŭropaj regantoj sciis, ke tataroj estas bonegaj, preskaŭ nevenkeblaj batalantoj. Tial ili volis siajn eksajn malamikojn pli bone ekscii, eventuale kun ili unuigi por batalo kontraŭ islamanoj. Militkunlaboro de eŭropanoj kun tataroj neniam okazis, ĉar tataroj estis toleremaj al aliaj religioj kaj kelkaj el ili eĉ fariĝis islamanoj.

Ankaŭ tataroj interesiĝis pri eŭropa kulturo. Ĥubilaj-Ĥano (1215–1294, nepo de Ĝingis-Ĥano), kiu transprenis mongolian ĉefurbon el Karakoromo en Ĥanbalikon (tio estas nuntempa Pekino), estis inteligenta kaj edukita homo, kiu ellernis ĉinan lingvon kaj interesiĝis pri kristanismo. Tial li bone akceptis italajn komercistojn el la familio Polo. La plej juna el ili, Marko Polo (*Marco Polo*, ĉirkaŭ 1253–1324) en sia verkaĵo Miliono priskribis mongolan Ĉinion kaj luksan korton de Ĥubilaj-Ĥano.

Odoriko el Pordenone naskiĝis iam en la jaroj 1280 – 1285 en nordorienta Italio (Regiono Friulo-Venecio Julia). Li estis filo de soldato Mattussi, kiu servis en ĉeĥa armeo. Tiam parto de Italio

apartenis al Primislidoj, Ĉeĥa Regno. Mattussi povis esti ĉeĥa *Matúš* (Mateo), tial oni opinias, ke Odoriko estis ĉeĥa-itala hibridulo. Lia patrino devenis el Udine aŭ ĝia ĉirkaŭaĵo.

La nomo Odoriko estas germana. Ĝi origine sonis *Hadal rihi* (posedanto de korto) kaj dum jarcentoj ŝanĝiĝis kiel *Uodal riĥ*, latine *Udalricus*, germane *Ulriĥ* (*Ulrich*), *Alariĥ*, ĉeĥe *Oldřich*.

Odoriko estis samtempulo de fama poeto Dante Alighieri (1265–1321). Oni precize ne scias, kie Odoriko naskiĝis. Verŝajne en la urbo Pordenone aŭ en ĝia ĉirkaŭaĵo, en la vilaĝo Villanova. Lia patrino devenis el la urbo Udine aŭ ĝia ĉirkaŭaĵo. Pri infanaĝo de Odoriko oni scias nenion.

Kiam Odoriko estas dekkvinjara, li monaĥiĝis en franciskana ordeno.

Post fino de studado li foriris en arbarojn, kie li vivis kiel asketo, fastis kaj kontemplis. Tio estis lia preparado por laboro de misiisto. Kiam li supozis, ke li estas pretigita por laboro de misiisto, li revenis en monaĥejon. Tie li estis ordinita.

Lia unua misio (1296–1310 aŭ 1300–1314) verŝajne daŭris 14 jarojn. Oni pri ĝi havas neniun informon. Nur la vikario Konrado de Pegaŭ, por kiu Odoriko verŝajne laboris, en sia letero laŭdis liajn bonajn lingvajn sciojn kaj kapablecojn.

Kiam Odoriko revenis, la papo Johano la 22-a lin sendis en alian mision, en Persion kaj Ĉinion. La dua misio de Odoriko denove daŭris 14 jarojn. El Venecio Odoriko per ŝipo veturis en Konstantinopolon, de tie en Trapezunton (nuntempan Trabzonon), Erzerum al Ormuza markolo. Li vizitis Hindion, Cejlonon, Sumatron, Javon, Borneon (tiam li proksimiĝis al Aŭstralio, sed ne sciis pri ĝi, ĉar Aŭstralio estis malkovrita nur en la jaro 1616). Trans Ĉinio Odoriko alvenis en Ĥanbalikon, ĉefurbon de mongola Ĉinio (1324–1325). Tie jam ĥano Jesentemer (*Jösöntömör*, *Jesün-Temür*) regis (1325–1328). Ni ne scias, kion en Ĥanbaliko Odoriko faris. Verŝajne li helpis al papa legato Giovanni de Montecorvino (1247–1328). Katolika hagiografio al li atribuis 20 000 baptitajn paganojn, sed tiu numero verŝajne estas troigo.

En Ĉinio Odoriko miris, ke ĉinoj manĝas serpentojn. Li priskribis interesajn ĉinajn kutimojn kaj manĝaĵon. Li observis, ke riĉaj ĉinoj havas tiel longajn ungojn, ke ili ne kapablas manĝi. Stranga estis kutimo defektigi piedojn de knabinoj per bandaĵoj. Mongola poŝta sistemo kaj uzado de paperaj banknotoj estis mirindaj (el Eŭropo Odoriko sciis nur metalajn monerojn. Sed precipe Odoriko priskribis lukson de korto de mongola ĥano.

Post tri jaroj Odoriko trans Tibeto vojaĝis hejmen. Verŝajne li estis la unua ĉeĥa vizitanto de Tibeto. En la jaro 1330 (1329) li revenis. Nek monaĥoj nek parencoj lin ne ekkonis – tiel malbele li aspektis. Ili eĉ ne kredis al liaj rakontoj. Ili miris, ke li revenis el sia misia vojaĝo, ĉar tiam estis normala, ke misiistoj foriris en misiojn kaj ili neniam plu revenis. Aŭ ili mortis kiel martiroj aŭ ili vivis ĝis fino de vivo inter indiĝenon kaj edukis ilin.

Odoriko diktis sian rakonton al Guglielmo da Solagna. Li ankaŭ volis viziti papon en Avinjono, por peti por pli grandan subtenon de la misiistoj en Azio, sed li jam estis tiel malsana, ke en Padova li devis sian veturadon ĉesi. Tie li diktis sian rakonton al Marchesino da Bassano.

Liaj rakontoj fariĝis vera sensacio. Eŭropanoj jam sciis romanon Miliono de Marco Polo, sed en romano de Odoriko estis novaj informoj, kiujn Marco Polo ne menciis. Bedaŭrinde en la tekstoj estas oftaj eraroj, kiujn kaŭzis skribistoj.

Odoriko mortis la 14-an de januaro 1331. Kaŭzoj de lia morto estis pulma fibrozo kaj totala elĉerpigo de fortoj kaŭze de tro aventura vivo. La pulma fibrozo estas ĥronika malsano, kies kaŭzanton oni ne ĉiam kapablas determini. Plimultiĝo de konektiva histo (pulma lighisto) en pulmo kaŭzas en fina stadio sufokon de paciento. Simptomoj estas malfacila spirado kaj iam rondaj ungojn sur manoj.

Aŭskultanta kuracisto aŭdas la sonon, kiu similas al malfermo de seka zipo. Tre endanĝeritaj grupoj de homoj estas ministoj kaj fumantoj.

Odoriko el Pordenone estis beatigita en la jaro 1755.

En la jaro 1375 Abrahamo Cresques kaj Jehuda Cresques fabrikis tiel nomatan Katalanian Atlason, en kiu ili publikis novajn geografiajn sciojn, kiujn alportis el sia longa vojaĝo Odoriko.

Oni povas dubi, ĉu Odoriko vere ĉeĥo estis. Italoj lin rigardas italo, slovenoj lin rigardas sloveno. Sed ĉu vere tio estas tre signifa?

Referencoj

- AŬTORA KOLEKTIVO (1993): Bible. Pismo svatě Starého a Nového zákona (včetně deuterokanonických knih). Ekumenický překlad. 3-a eldono, Český Těšín, Česká biblická společnost 1993, 283 paĝoj. [Biblio. La Malnova kaj Nova Testamentoj kun la Duakanonaj Libroj; ĉeĥlingve]
- AŬTORA KOLEKTIVO (2006): Biblio. La Malnova Testamento tradukita de Ludoviko Lazaro Zamenhof kun la Duakanonaj Libroj tradukitaj de Gerrit Berveling. La Nova Testamento tradukita de la Brita Komitato (John Cyprian Rust, B. John Beveridge, C.G. Wilkinson). 1-a eldono, IKUE kaj KELI, Dobřichovice, Kava-Pech 2006, 1375 paĝoj. [esperantlingve]
- CHALOUPKOVÁ, L. (2008): 800. výročí založení nezávislého mongolského státu, paĝoj 279-286, En:*
- DOUBKOVÁ, M. (2017): Idiopatická plicní fibróza – časná diagnostika má stále význam. Med. praxi 14: 45-48.
- FISCHER, O.A. (2012): Kiel Japanio apertiĝis al la mondo. Kluba prelego, la 7-an de marto 2012. www.literatura.bucek.name/brno//fischer-japanio.pdf.
- HORA-HOŘEJŠ, P. (1995): Toulky českou minulostí. 1-a eld., Prago, Baronet, 454 paĝoj.
- LIŠČÁK, V. (2008a): Odorik z Pordenone a východní kraje světa, paĝoj 9-24, En:*
- LIŠČÁK, V. (2008b): Odorikův příspěvek k rozšíření geografických znalostí o Východu v Evropě, paĝoj 47-66, En:*
- LIŠČÁK, V. (2019): Bratr Odorik a jeho zpráva o východních krajích světa. Styky Evropy a mongolské Číny ve 13. a 14. století, 1-a eld., Prago, Academia, 662 paĝoj.
- PUMPR, T. & KAVKA, J. (1970): Pošatlaso de la mondo. 1-a eld., Prago, Kartografie, 55 paĝoj.
- ROBERTS, J.M. (1999): Ilustrované dějiny světa IV. Na rozcestí tradic. 1-a eld., Prago, Euromedia Group, k. s., Knižní klub a Balios, 192 paĝoj.
- VÁŠÁKOVÁ, M. (2015): Léčba idiopatické plicní fibrózy v České republice v roce 2015. Interní Med. 17: 128-132.
- YANAGIHARA, T., SATO, S., UPAGUPTA, C. & KOLB, M. (2019): What have we learned from basic science studies on idiopathic pulmonary fibrosis? European Respiratory Revue, 2019 28: 190029; DOI: 10.1183/16000617.0029-2019

*) SOMMER, P. & LIŠČÁK, V. (Ed.): Odorik z Pordenone: z Benátek do Pekingu a zpět. Setkávání na cestách Starého světa ve 13. a 14. století / Odoric of Pordenone: from Venice to Peking and Back. Meetings on the Roads of the Old World in the 13th and 14th Centuries. – Sborník příspěvků z mezinárodní konference, Plzeň, 13.-14. listopadu 2006 / Proceedings of the International Conference, Pilsen, 13th to 14th November 2006. Centrum mediévistických studií (CMS) / Centre for Medieval Studies (CMS), Praha, Filosofia, 2008, 288 paĝoj.

Bildo 1

Memoro de tataro ĉeesto en Moravio (1241):

Oreloj de Štramberk (*mielkukoj*)



ŠTRAMBERK



Bildo 2

Čeňlingva literaturo pri Odoriko el Pordenone

